



ALVOKO NE FORGESI KURDION

Reprezentantoj de la Kurda Ruĝa Krescento(3) asertis, ke la internacia komunumo simulas ne vidi ilian situacion. Ili denuncis, ke la Islama Ŝtato tenas 2000 prizonulojn en Roĵavo, kaj ke ĝi ne povas zorgi pri ili.

Jamila Hami kaj Shewan Beri estas reprezentantoj de la Kurda Ruĝa Krescento. Tiu neregistara organizaĵo estas enradikiĝinta en Roĵavo(2) kaj Suda Kurdio(3), kaj ties 700 laboristoj kaj miloj da volontuloj laboras en la prisana kampo. Interalie, ili ĉeestis en la bataloj de Kobano, Rakaho kaj Afrino kaj unuan fojon ili venis al Eŭropo kun siaj proklamoj.

En oktobro ili renkontiĝis kun la politikaj grupoj de la Eŭska Parlamento, por ke ili subtenu longdaŭran projekton: “Kaŭze de la milito ĉirkaŭ 4000 homoj perdis manon aŭ kruron. Temas pri infanoj, virinoj kaj batalantoj, ĉiaspecaj viktimoj. Ni petis ilin helpi la protezejon. La partioj respondis, ke ili pristudos la aferon. Tie ĉi ni trovis empatian.”

Ili ne restis nur en Eŭskio; kun la celoj plenumi urgajn celojn kaj atingi financadon por gravaj projektoj la turneo portis ilin en aliajn landojn. Fakte, la Kurda Ruĝa Krescento venis al Eŭropo kun du celoj. La unua estas garantiu la daŭro de la landlimo inter Sirio kaj Irako: “Ĝi estas la 2393-a limo de la Unuiĝintaj Nacioj, kaj ni kaj aliaj NROj ricevas tra ĝi niajn sendaĵojn. Por ni nepras, ke ĝi restu malfermita. La limo kun Turkio estas fermita, kaj kvankam ni havas alian limon kun la Regiona Kurda Registaro de Suda Kurdio ĝi ne estas oficiala kaj, ĉar Turkio havas grandan politikan influon tie, oni povas fermi ĝin iam ajn.” Por ke la limo restu malfermita, ili renkontiĝis kun reprezentantoj de la franca registaro, ĉar tiu ĉi estas permanenta membro de la Konsilio pri Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj.

La tria kialo de ilia vojaĝo estas la eksterlandaj kaptitoj de la Islama Ŝtato: “En Roĵavo ni havas 2000 kaptitojn de la IŜ en specialaj kampadejoj. La plejmulto estas virinoj kaj infanoj, kaj ni ne povas surprizi tian respondecon. La aŭtonoma memadministrado de Norda Sirio ne havas la kapablon ilin ensociigi en la komunumoj, kaj en la normalaj rifuĝint-kampadejoj oni ne akceptos ilin. La delokigitaj de Sirio kaj Irako, ekzemple, tiuj de Mosulo, ne volos ilin inter si.”

La situacio neniel facilas. En unu flanko estas ĝihadistoj kaj radikalaj islamistoj, kaj aliflanke estas multaj infanoj. “La devenlandoj devus surprizi tiun respondecon, almenaŭ rilate la infanojn. Ili ne kulpas kaj rajtas ricevi edukon kaj socian prizorgon. Ni ne povas tion garantiu.”

Entute estas kaptitoj el 44 landoj, kaj ne nur el okcidenta eŭropo, ĉar ankaŭ estas iuj el Rusio kaj Ĉinio. Tamen, Hami kaj Beri volis substreki, ke la kerno de la konflikto estas politika: “Ni ne havas problemon por akcepti rifuĝintojn, sed tiuj ĉi ne estas rifuĝintoj. Ni devas zorgi pri iliaj sano kaj bezonoj, kaj, por tio, ni devas zorge elekti la personojn, kiuj laboras kun la kaptitojn de la IŜ. Roĵavo malgrandas, kaj ties homoj suferis perforton fare de la IŜ. La pensmaniero kaj de la kurdoj kaj de la IŜ kontraŭas; do, ili ne povas esti tie ĉi. Ni amas la homrajtojn, ili ne.”

Vidinte la malintereson de tiuj 44 landoj, ili memorigis la moralan ŝuldon de la mondo kun la kurdoj kaj ke necesas solvi la problemon pri la kaptitoj en konvena maniero: “La Islama Ŝtato atakis en Barcelono, Parizo kaj Bruselo, sed oni ne devas forgesi, ke kontraŭ la IŜ la kurda popolo staris ĉe la unua frontlinio.”

Ĥemiaj bombadoj

Menciante la neglektemon de la mondo, Hami kaj Beri senĉese memorigas pri la situacio en Afrino. “Pli ol 100 000 loĝantoj de la kantono estiĝis rifuĝintoj en *Xahba* kaj *Tal Riffaat*.”

Kiam Turkio kaj diversaj ĝihadismaj grupoj invadis la kurdan kantonon pasintan januaron, ambaŭ mergiĝis en la militon. Hami kunordigis la laborojn de la Kurda Ruĝa Krescento en la fronto, kaj lian ambulancojn oni atakis kelkfoje. “Ni priatentas la batalantojn kaj civilulojn de ĉiuj flankoj, sed la turkoj metis nin en la pafcelon.”

Beri, aliflanke, kolektis informojn pri la vunditoj kaj mortintoj por ilin disvastigi: “Ni dividis ili kun ĉiuj, kun kiuj ni rilatas; malmultaj homoj respondis, kaj neniam iu registaro. Por la registaroj pli gravis teni la rilaton kun Turkio. Kio okazis al ni estis brutalaĵo, kaj neniu ĝin denunciis.”

La kurdoj ofte suferis masakrojn, kaj la internacia komunumo kutime respondis al ili per neglekto. Kun la paso de la tempo famiĝis la ĥemiaj atakoj de Saddam Hussein, sed, dum la invado de Afrino antaŭ nur kelkaj monatoj, du similajn kazojn dokumentis la Kurda Ruĝa Krescento. “Dum la preparoj por liberigi Rakahon, la Observejo de Homaj Rajtoj(4) kaj Unuiĝintaj Nacioj trejnigis nin por alfronti ĥemiajn atakojn. Fakte, ni sciis, ke la IŜ posedis tiajn armilojn. En Afrino Turkio kaj la ĝihadismaj grupoj uzis dufoje kloran gason.”

Plej gravas, ke la invado ekigis “etnan purigadon” en la kantono: “Post detruo la infrastrukturojn – la akvoportan, ekzemple –, oni estas detruantaj la spurojn de la kurdoj – oni forhakas la olivarbojn, detruas la antaŭislamajn templojn ...– La plej zorgiga estas la demografia ŝanĝo. Post forigi la kurdojn, Turkio venigis la ĝihadistojn de Gutao, kaj donis al ili loĝejojn.”

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

(1) Heyva Sor a Kurdistanê.

(2) Okcidenta Kurdio/Rojavayê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la siria ŝtato.

(3) Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.

(4) Human Rights Watch.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Aitor Aspuru.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berrria la 4-an de Decembro 2018-a.

Tradukis: NXC. Decembro 2018-a. Provlegis: DS.

